I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

nº 8 - 9 Majo kaj junio 1955

## INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO 1955

### 7an I. F. E. F. kongreso

**Zürich 8-a - 13-a de majo**

### Raporto pri la 7-a I.F.E.F. kongreso en Zürich

Dimanĉo la 8-a de majo la plej parto de la kongresanoj alvenis en Zürich. Ĉe la stacidomo granda Esperanta flago indikis ke la Akceptejo estas proksime. En la akceptejo mem la kongresanoj ricevis la dokumentojn kaj la adreson de la koncernaj loĝejoj. Estas preskaŭ senutila afero aldoni vortojn pri la ege bela urbo Zürich. Oni povas diri tute simple: ĝi estas belega, impona, vastega, moderna kaj allega.

La interkonatiĝa vespero okazis, kiel la programo fiksis, en la granda salono de la hotelo Limmathaus kaj kiel kutime dum niaj kunvenoj la medio estis ege afabla.

Lundo la 9-a de majo la Prezidanto, S-ro Stapel el Amsterdam malfermis la kunsido de la Estraro kaj Delegitaro presentante la Delegitojn de novaj landoj aliĝantaj al la I.F.E.F. (tie estas la Hispanujo, Sarlando, kaj Juogoslavujo) krom la Sekretario de Esperanta Muzeo en Vieno S-ro Steiner.

De la 9-a h. ĝis la 12-a la diversaj delegitoj parolis pri la enlanda movado en generale formo. Oni rimarkas precipe: interrilatojn kun la Fervojaj Administracioj kaj kun la landaj asocioj, kaj kun la koncernaj sindikatoj.

Dum la sama tago okazis vizitoj al Centra Komandejo Zürich H B kaj al S.B.B. Centra Riparejo Zürich-Altstetten.

Je la 17-a h. oni diskutis pri la terminara komitato.

Fine, je la 20-a h. en la granda salono de Limmathaus okazis la Solena Malfermo de la Kongreso. A parte estas enskribita la listo de la gastoj kiuj alparolis.

Mardo la 10-a de majo okazis la unua laborkunsido. Dum 3 horoj la diskutado temis precipe pri: Terminara Komitato, rilatoj kun U.E.A., ĝenerala financa situacio, kotizoj, salutoj letere de diversaj landoj, bulteno, regularo de la Kongresoj k.t.p.

Posttagmeze okazis la komuna fotografiĝo ĉe la Nacia Muzeo.

Vespere oni vidis anoncitan prezentadon dokumentan filmon pri Svislandaj fervojaj aferoj kaj nacia vivo. matene

Merkredo la 11-a de majo la diversaj diskutoj daŭriĝas resume temantaj pri: elekto de la ĉef-estraro (reelektita per aklamado); propono pri infana desegno-

ekspozicio; organizado de la venontaj kongresoj, provizore estas fiksitaj jene:
8-an I.F.E.F.-kongreso 1956 - Stockholm Svedujo.
9-an I.F.E.F.-kongreso 1957 - Jugoslavujo
10-an Jubilea I.F.E.F.-kongreso 1958-Danlando.

Posttagmeze dum la ŝipekskurso sur la lago de Zürich la pluvo vere ĝenis la kongresanojn.

Vespere en la granda salono de Limmathaus la kongresanoj ĝuis belegan folkloran prezentadon pri muziko, ĥoroj, dancoj, gimnastikaj ludoj kaj gajaj humoraĵoj.

Ĵaŭdo la 12-a de majo lasta laborkunsido! En tiu ĉi tago ĉiuj rimarkis ke la 7-a I.F.E.F.-kongreso donas al si bonan impreson ĉar la altnivelo de la diskutoj aligas al plej bonaj esperoj en la estonteco.

Fine, Posttagmeze la kongresanoj per autobusoj rondveturis tra la urbo ĝuante la famkonatajn panoramojn de Zürich.

Vendredo la 13-a de majo parto de la kongresanoj per speciala trajno forveturis al Vevey ĉe la Lemana Lago por viziti la narcizajn kampojn de "Les Plejades".Bona vetero kontribuis plibeligi la ekskurson kiu estis vere neforgesebla.

La Italaj gekolegoj partoprenintaj al la 7-an I.F.E.F.-kongreso rimarkis la bonegan organizadon kaj la bonan sukceson de la kongreso mem kaj korege sendas al la L.K.K. korajn dankojn kaj gratulojn pri la perfekta kaj agrabla akcepto.

Ĝis la revido al Stockholm!

## A N O N C E T O N

Du junaj ĉeĥoslovakaj fraŭloj deziras korespondi pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. Skribu al: Josef Novotuý, Buchlovska 21, VELEHRAD (Morava) ĈEĤOSLOVAKIO kaj Josef Novotuý, Muchalmu 74, p. VELKE-FERNOSEKY, ĈEĤOSLOVAKIO.

# I N T E R N A C I A   F E R V O J I S T A   K O N G R E S O   1 9 5 5

7a I F E F kongreso

Zürich 8a - 13a de majo

Listo de la gastoj kiuj alparolis la kongreson dum la Solena Malfermo

1. La delegito de la urbestraro de Zürich
   S-ro W. Thomann, urba konsilisto, estro de la komunuma oficejo por industriaj servoj Zürich
2. la delegito de la Ĝenerala Direkcio de la svisaj federaciaj fervojoj
   S-ro d-ro Hertli, Estro de la sekcio por la dungitaro de la 3a regiono de la federaciaj fervojoj , Zürich
3. la delegito de la ĝenerala direkcio de la aŭstria federacia fervojaro
   S-ro kortega konsilisto Hugo Steiner, Vieno
4. la delegito de la transportentrepreno Van Gend en Loos, flankentrepreno de la nederlandaj ŝtatfervojoj
   S-ro J. J. Labordus, Utrecht
5. la delegito de la svedaj Ŝtatfervojoj
   S-ro Hjalmar Olsson, Stockholm, kiu ankaŭ parolis en la nomo de la sveda fervojista sindikato
6. S-ro D-ro Prof. Edmond Privat, Honora prezidanto de Radio Genève
7. S-ro E. Birbaum, sekciestro ĉe la ĝenerala sekretariejo de la svisaj federaciaj fervojoj
   prezidanto de la unuiĝo arta kaj intelekta de Svisaj Fervojistoj
   kaj reprezentanto da la F. I. S. A. I. C. (Fédération Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles des Cheminots)
8. la delegito de la svisa fervojista sindikato S. E. V.
   S-ro W. Meier, sekretario kaj redaktoro de la sindikata organo "Der Eisenbahner" (la fervojisto) , kiu ankaŭ transdonis salutojn de la internacia Transportlaborista Federacio I. T. F.
9. la delegito de la aŭstria fervojista sindikato
   S-ro O. Kovačič, Wien
10. la delegito de la jugoslava fervojista sindikato kaj de la kultura organizo de la jugoslavaj fervojistoj
    S-ro inĝ. L. Szekeres, Novi Sad
11. la delegito de la sociala organizo de la germanaj fervojoj
    S-ro Hasse, Frankfurt

la delegitoj de la landaj I.F.E.F. sekcioj:

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstrujo: | S-ro Bürger | Linz | Italujo: | S-ro | Zacconi, | Bologna |
| Britujo: | S-ro Parry | London | Jugoslavio: | F-ino | Milisavljevič, | Beograd |
| Danujo: | S-ro Braendstrup | | Nederlando: | S-ro | Hoogendijk | |
| Finlando: | S-ro Louhevirta | | Norvegujo: | S-ro | Lund, | Ski |
| Francujo: | F-ino Lemonnier | Paris | Saarlando: | S-ro | Höh, | Homburg |
| Germanujo | S-ro Hasse, | Frankfurt | Svedujo: | s-ro | Ohlssen, | Ystad |
| Hispanujo: | S-ro Saladrigas | | Svislando: | S-ro | Sonderegger | Zürich |

La prezidanto de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj
S-ro W. Stapel, Amsterdam.

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Aŭstrujo | 20, | Britujo | 5, | Danujo | 19, | Finnlando | 7, | Francujo | 48, |
| Germanujo | 70, | Hispanujo | 5, | Italujo | 19 | Jugoslavio | 12, | Nederland | 22, |
| Norvegujo | 1, | Saarlando | 1, | Svedujo | 9, | Svislando | 25, | En tute | 263 |